# 弁道話

# (Bendōwa)

* mankas Esperata titolo al la traduko

Por akiri al si plej altan bodion (=Budhan saĝon) troviĝas la plej bona kajkonstanta rimedo, kion praktikis eminentaj antaŭuloj. Kvankam la rimedo herediĝas de antaŭuloj al posteuloj, tamen, neniuj eraras, ĉar ĝia kriterio estas, ĉu li spertis aŭ ne la ver-vekiĝon.

Por ĝui la samadion (=ver-vekiĝon) la zen-sido ja estas la fronta pordo. Kvankam la ver-vekiĝo estas abunde havata de ĉiuj homoj, tamen, se oni ne sinekzercas, ĝi ne aperas al li. Kaj li ne povas ĝin enmanigi al si, se li ne spertis ĝin. La ver-vekiĝo ree pleniĝas sur lia mano, eĉ se li fordonis ĝin al aliaj, ĉar ĝi ne rilatas al la kvanto. Ĝi ree pleniĝas en lia buŝo, eĉ se li fordiris, ĉar la vortoj menciindaj pri ĝi sinsekve naskiĝas en li. Budhoj (=ver-vekiĝintoj) ĉiam rigardas la internan esencon sur objektoj kaj fenomenoj de flanke de la bodio. Pro tio ili ne restigas en la koro la surfacan aspekton de tiuj. Ankaŭ ordinaruloj vidas samon ĉiam tra la bodio, sed ili ricevas nur la surfacon, ne povas akiri la esencon.

La metodo, kiun mi nun montras, celas, ke vi rigardu ĉion tra la bodio, kaj ke vi vivu kun la bodio eĉ en la ĉiutaga vivo. Al tiu ŝanĝiĝo de la rigardo la metodo (=zen-sido) validas.

De kiam mi decidis la koron serĉi la budhan vojon, migre vizitis eminentajn gvidantojn ĉiuloke en tiu ĉi lando. Kaj iam mi renkontis la budhiston Mjoŭzen en la viharo (=budhisma templo) Ken'nin-ĵi. Sub lia gvidado flue turniĝis 9 fojoj de prujnoj kaj floroj (=9 jaroj). Tie mi iom lernis de la sekto Rinzai (=unu el zenismoj). La zenisto Mjoŭzen, kiel erudicia disĉiplo de la sekt-estro Eisai, sola heredis pravan budhismon (=Rinzai-zenon) de la estro. Li estis tiel saĝa, ke troviĝas neniuj kompareblaj kolegoj.

Krome mi vizitis Ĉinion, vagis en la distriktoj Ĝe-ŝji kaj Ĝe-dong serĉante eminentan gvidanton, vizitis kvin zen-sektojn. Kaj finfine mi trovis la zeniston Ĵuĝjing sur la Monto Tjantong-ŝan, kaj tie mi povis decidi la celon, kiun mi volas ellerni dum la tuta vivo. Post tio mi reniris la hejmlokon komence de Ŝaŭding periodo (ĉina) por disvastigi la budhismon kaj savi homojn. Mi tamen sentis la mision kvazaŭ mi surportus pezan ŝarĝon sur la ŝultroj.

Por atendi la ŝancon manifesti la mision, mi decidis vagi kiel flosanta nubo same kiel iamaj majstroj. Sed mi pensis, ke okaze troviĝus aŭtentikaj studantoj, kiuj dekomence ne ĉelas renomon nek profiton, sed nur serĉas la vojon. Ili, domaĝe, estas konfuzitaj fare de falsaj gvidantoj, situas for de la vera instruo, kaj foje estas ebriaj pro sia arbitra kompreno. Pro tio ili perdiĝus en labirinton. Per kio ili povas kreskigi la veran semon de praĝnjo (=budha saĝo), kaj kiel akiri la frukton de la ver-vekiĝo?Sed ĉar mi nun vagas, ili ne povas veni al mi en iu certa loko. Tion mi bedaŭras. Pro tio mi decidis skribi la scikonon de preceptoj kaj manieroj, kiujn mi kolektis ĉe la zen-viharoj en Ĉinio, kaj volas restigi per

libro la kernon de la budhismo al la studantoj, por ke ili konu la veran instruon de la budhismo. Tio ĉi ne estas lerta metodo!?Nu ek!

La Granda Majstro Gotamo la Budha nomis Mahakassapa-n kiel la darmo- sukcedanton en la kunveno sur la sankta monto Agro Pinto. De tiam la prava instruo estis heredita de majstro al majstro ĝis la majstro Bodidarma (hindo). Kaj li mem enmigris en Ĉinion, heredigis la instruon al Hujke (ĉino). Tio estas la unua enporto de la vera instruo en la orientajn landojn.

Tiele heredite la instruo atingis la sesan sukcedanton Daĝjan (ĉino). De tiam la prava instruo vaste koniĝis en Ĉinio, kaj fariĝis, ke ĉiuj povas lerni la budhismon. Tiutempe sub la majstro Daĝjan troviĝis 2 eminentaj disĉiploj t.e. Nan'jŭe- Hŭaj'ĵang kaj Ĉing'jŭan-Ŝing'si. Ambaŭ heredis la budhan kor-signon (=la darmon). kaj estis nomataj kiel gvidantoj de homoj kaj ĉieluloj. De ambaŭ disĉiploj naskiĝis 5 sektoj. Nome, sektoj Fajan, Vejjang, Caŭdong, Junmen kaj Linĝi. Nun (=en la 13 jc.) en Ĉinio prosperas nur la Linĝi-sekto. Kvankam la 5 sektoj havas malsaman nomon, tamen ĉiuj heredis la saman budhan kor-signon.

De la Post-han-dinastio (Ĉinio) diversaj sekt-instruoj kreiĝis, sed ne decidiĝis en diskutoj, kiu estas la plej bona. Tamen, kiam la majstro Bodidarma venis, li tuj fortranĉis la radikon de la diskuto, kaj de tiam la pura budhismo disvastiĝis. Ankaŭ en nia lando same okazu, mi esperas.

Ĉiuj majstroj, kiuj ricevis kaj heredigis la veran instruon, sciis, ke la zen-sido, en kiu ili mem spertis ver-vekiĝon, ja estas prava metodo por la bodio. La majstroj en Hindio kaj Ĉinio, kiuj ver-vekiĝis, alprenis la saman metodon. Per intima vid-al- vida gvido ili heredadis la esencon de la instruo.

La vera historio de budhismo diras. Tiu ĉi rekte heredita metodo estas la plej alta en la plej altaj. En la metodo de la ekzerco-komenco vi ne bezonas incensi, fari ceremonion, preĝi, konfesi nek reciti sutron, sed vi nur sidadu por emancipi vin je la koro kaj la korpo.

Kiam oni zen-sidas eĉ iom da tempo esprimante la budhan kor-signon en la tri karmoj (=korpo, buŝo kaj koro) kaj eniras en la samadion, tiam ĉiuj estaĵoj montras la budhan kor-signon, kaj ĉio de la tuta mondo troviĝas en la bodio. Pro tio la zen-sidado aldonas pli da ĝojon al budhoj, kiuj jam akiris la bodion, renovigas la vojon al la ver-vekiĝo, kaj tuj pur-heligas la koron kaj la korpon de la tuta vivaĵo en la 3 fatalaj vivoj (=la naraka, la avida kaj la bestia) kaj 6 destinitaj vivoj (=la 3 fatalaj plus la asura, la homa kaj la ĉiela) en la tuta mondo. Ili konstatas sian emancipiĝon je sia koro kaj korpo, kaj trovas la konvenan seĝon al si. Tiam la tuta vivaĵo ver-vekiĝas, kaj pere de la budha forto facile transiras la muron al la bodio, kune sidas kun Budho sub la bodi-arbo, komencas prediki la instruon senkompareble altan, kaj disvolvas la eternan kaj profundan praĵnjon (=la budhan saĝon).

Ĉar tiuj vekigitaj bodioj intime komunikas sin reciproke, la zen-sidanto povas certe emancipi sin je la koro kaj la korpo. Li tuj fortranĉas ĝisnunajn banalajn sciojn kaj pensojn, sed renkontas la aŭtentikan bodion. La bodio etendas la budhan forton al eĉ et-etaj zen-ekzercejoj por asisti gvidantojn, donas motivon kreskigi la budhecon, kaj stimulas la ekzercadon por plialtigi la budhecon. Tiam, ĉar eĉ la kreskaĵoj kaj senvivaĵoj en tiu mondo eklaboras por la bodio, la estaĵoj, kiuj profitas de la laboro, senescepte ver-vekiĝas je

konvena al si per la helpo de la mistika funkcio de la laboro. Kaj ili peras la aŭtentikan bodion al tiuj, kiuj kune vivas kaj komunikas. Pro tio ili senescepte ricevas la senliman budhan virton, kaj sinsekve disvolvas en kaj ekster la medio la budhan instruon ne elĉerpeblan, senĉesan, ne-supozeblan kaj ne-mezureblan.

Kvankam la forto de la bodio estas tiel forta, tamen, la laboro kaj la rezulto ne estas sentata de la zen-sidanto per la ordinara homa sens-organo, ĉar la zen- sido estas senmova stato en kvieta ĉambro, kaj la forto ne rilatas al la homa percepto.

Se, kiel ordinaruloj erare vidas, ke la zen-sidado kaj la ver-vekiĝo estas malsamaj 2, tiam oni povas distingi ambaŭ respektive. Sed, se io estas sentebla per la homaj sensoj, tio ne estas la bodio, ĉar la homaj sensoj ne povas atingi ĝis la bodio.

Kaj (okaze de la zen-sidado) la zen-sidanto estas trankvila je la koro, kaj la loko estas kvieta. Pro tio kvankam li en- kaj el-iras je la darma mondo, tamen li ne movas eĉ polveron nek donas ŝanĝiĝon al la sid-loko, ĉar la zen-sido estas lia persona sperto en sia koro. Sed (verdire) li disvolvas grandan agadon, nome. li predikadas la profundan kaj fajnan instruon de budho.

Herboj, arboj kaj eĉ la teroj, al kiuj etendiĝas la edifado, elradias (budhan) lumegon, kaj pruvas senlime la akiritan bodion fajna kaj profunda. La herboj, arboj kaj ankaŭ tegol-pecoj respondadas al la espero de la zen-sidanto, dume li pliprofunde predikas al ili. En la medio, en kiu zen-sidanto mem ver-vekiĝas kaj ver-vekigas aliajn, dekomence ne troviĝas nesufiĉan parton de la bodio, kaj la procedo de ver-vekigo estas ekzakte praktikata sen stagno.

Pro tio, en la zen-sidado eĉ fare de unu sola homo dum mallonga tempo, la zen-sidanto akordiĝas kun ĉiuj aliaj kolegoj (, ne nur homoj), kaj lia bodio komunikiĝas senescepte trans la tempo en la senfina darma mondo, nome la edifado disvastiĝas ne nur nuntempe, sed ankaŭ pasintece kaj future. En tiu tempo la zen-sidanto kun aliaj ĉiuj kolegoj fariĝas la unuagradaj ekzercantoj, kiuj komune havas la saman bodion.

La efiko de zen-sido ne limiĝas nur en la zen-tempo, kvazaŭ sonorilo sonorあs antaŭ kaj post la frapo, la forto de samadio sonorigas aeron, kaj donas mirindan efikon al ĝia ĉirkaŭo. Ne nur tio. Ne nur la zen-sidanto, sed ankaŭ ĉiuj kolegoj kune sinekzercas per aŭtentika metodo, sidas en sia origina fazo de memo. Kaj neniuj povas mezuri la kvanton de la virto (=rezulto de zen-sido) per ia ajn mezurilo.

<1> Nun mi (=demandanto) aŭskultis, ke la merito de la zen-sido estas tiel granda. Sed ordinaruloj dirus kun dubo, ke diversaj metodoj troviĝas enbudhismo. Pro kio vi rekomendas nur la zen-sidon?

Mi (=respondanto) montru. Ĉar la zen-sido estas la fronta pordo de budhismo.

<2> Volu montri. Kial vi povas diri, ke la zen-sido sola estas la fronta pordo?

Mi montru. La granda majstro Gotamo la Budha mem spertis la metodon prava, kaj ankaŭ ĉiuj tatagatoj en la tri tempoj (pasinta, nuna kaj estonta) same ver-vekiĝis per la zen-sido, pro tio ili heredigis la metodon prava. Kaj ne nur tio, sed ankaŭ ĉiuj majstroj en la tuta mondo ver-vekiĝis per la zen-sido. Pro tio mi diras al ĉiuj homoj kaj ĉieluloj, ke la zen-sido estas la fronta pordo de budhismo.

<3-1> Volu montri. Estas certe, ke vi precize heredas la fajnan instruon de Gotano la Budha, kaj la studo de kondutoj de iamaj majstroj devas indiki ĝustan heredon. Por ni, laikoj, estas malfacile sekvi tion.

Tamen, la recitado de sutroj kaj preĝo al budho ankaŭ estas motivoj de la ver-vekiĝo, oni diras. Dume vi nur sidas, kaj nenion faras. Per kio vi povas akiri la ver-vekiĝon?

Mi montru. Nun vi pensas, ke la ver-vekiĝo de ĉiuj majstroj, kaj, ke la plej fajna instruo estas simpla sidado nenifara kaj vana. Tio signifas, ke vi blasfemas la mahajanon. Vi estas terure sen-scia, kvazaŭ vi dirus, ke ne troviĝas akvo estante en la maro. Male, estas dankinde, ke jam multaj eminentaj antaŭuloj ĝuas en la propra samadio. Tio ĉi ne estas granda merito de la budhismo? Kompatinde estas, ke viaj okuloj ankoraŭ ne malfermiĝas, kaj, ke la koro plu stagnas en ebrio.

Malnete, la akirita medio de la majstroj superas nian imagon, kaj oni ne povas atingi ĝin per (ordinara) konsidero, des pli ordinaruloj sen-kredaj kaj et-saĝaj neniel povas scii, eĉ se mi predikus. Nur tiuj, kiuj firme kredas kaj kaptis (veran) motivon, povas vidi la medion. Ne-kredantoj tute ne komprenos, eĉ se mi klarigus. Estas legendo, ke iam, kiam la Gotamo la Budha komencis prediki la instruon sur la Monto Agla Pinto, ne malmultaj kunvenintoj foriris,(pretekste, ke ni jam scias tion) (=anekdoto en la sutro Darma Floro).

Kiam vi povas ekhavi la kredon, tiam vi sinekzercu kaj lernu, se ne, vi ĉesu portempe. Vi sciu, ke la lernado ne estas indulgema de antaŭe.

<3-2> Kaj ĉu vi scias, kiom validas por ver-vekiĝi la recitado aŭ preĝado? Oni kredas, ke movi langon kaj eligi voĉon estas servado al budho. Li vane klopodas! Eĉ se li volas proksimigi tiun metodon al la budhismo, male li situas ege for de la vera budhismo. Kaj vi devas scii, ke sutroj montras nur la rimedojn de la ver-vekiĝo hazarda aŭ iom-post-ioma. Kaj la sutroj promesas al vi nepre atingi la bodion, se vi sinekzercos laŭ ili. La sutroj estis skribitaj kiel helpiloj de ver-vekiĝo, sed ne por serĉi la signifon de la uzataj vortoj, nek por laŭte legi.

Oni volas atingi la bodion daŭr-daŭre kaj vane movante la buŝon, sed tio similas al, ekzemple, ke oni volas marŝi suden direktante la kaleŝon al nordo, ali- ekzemple, enigi kvadratan trabon en rondan truon. Ili ne scias kiel sinekzerci, malgraŭ, ke ili legas la sutrojn, kvazaŭ kuracisto ne povus legi kiel aranĝi medikamenton. Kian meriton tio alportos al ili senĉese eligante la voĉon, kvazaŭ ranoj kvakus tage kaj nokte sur printempa riz-kampo!? Kio rezultos finfine precipe por tiuj, kiuj emas delogiĝi de renomo kaj profito, kaj kiuj ne povas forigi la recitadon k.a.(por paradi sin)!? Ili estas tre multe avidemaj (kontraŭ la instruo). Tiaj okazoj troviĝis antaŭe, povus troviĝi ankoraŭ nun. Estas plej kompatinde!

<3-3> Nun ni devas scii. La prava metodo fare de 7 paseaj Budhoj (=budhisma mito; Antaŭ Gotamo la Budha troviĝis 6 Budhoj.) estas certe heredata kaj tenata. Kaj zen-lernantoj, kiuj firme kredas kaj sinekzercas sub la gvido de eminenta majstro, povas atingi la celon kaj teni (la bodion). Tian horizonton ne povas scii tiuj, kiuj nur instruas vorto-signifojn kaj predikojn de sutroj. Pro tiu kialo vi forlasu suspekton kaj heziton, kaj zen-sidu sub la gvido de la aŭtentika gvidanto, (certe) vi povos atingi la bodion (kaj ĝui ĝin) same kiel eminentaj antaŭuloj.

<4-1> Volu montri. Nun oni diras, ke la sutroj Darma Floro kaj Flora Ornamo, kiuj estis enkondukitaj en nian landon, estas la pintoj de la mahajano. Precipe la sekto la mantrismo, kiu estis heredita de la tatagato Maha-Vajroĉana al Vaĝrasatvo, kaj sen-konfuze heredîĝis ĝis nun. Ĝi pretendas, ke 'la koro mem estas budho' kaj 'budiĝi en sama koro', nome, sen longdaŭra ekzerco, sed per unufoja ceremonio, oni povas akiri la bodion de kvin budhoj (=Maha-Vajroĉana kaj diigitoj de la kvar liaj funkcioj). Oni diras, ke tio estas la ekstremo de budhismo. Kial vi rekomendas nur vian ekzercon preterlasante la aliajn metodojn, kaj en kiu punkto via ekzerco estas elstara kompare kun la aliaj?

<4-2> Mi montru. Vi devas scii. Kiel budhano oni ne taksu la sutron alta aŭ ne, profunda aŭ ne, sed devas distingi la ekzercon prava aŭ ne. Iam antaŭe iu rimarkis la esencon de la budhismo per persika floraĵo, la alia akiris la motivon faletinte sur monta vojo. (=anekdotoj de iamaj majstroj en Ĉinio.). Tiaj ver-vekigaj ŝancoj troviĝas ĉie ajn en la naturo pli ol sufiĉo. Aliokaze oni diras, ke la tuta instruo de Gotamo la Budha povas enŝoviĝi eĉ en malgrandan polveron. Pro tio (direblas de niaflanke,) la frazo 'la koro mem estas budho' similas al la luna figuro sur la akvo, kaj la frazo 'senprokrasta budhiĝo' similas al iluzio sur spegulo. Vi ne perdiĝu en ruzan vort-turniĝon. Nun mi rekomendas al vi la pravan metodon heredatan de la majstroj, kies ekzerco rekte kondukas vin al la vera bodio. Mi montras tion, por ke vi fariĝu la aŭtentikaj voj-irantoj.

<4-3> Kaj, se vi volas lerni la instruon, vi nepre devas elekti ver-vekiĝinton kiel gvidanton, sed neniam tiun, kiu nur kalkulas liter-nombrojn (de sutro). Tio similas al tio, ke blindulo kondukas blindularon. Nun nia samgo respektas saĝulojn, kiuj akiris la bodion, kaj tenas la budhan signon. Pro tio eĉ diuloj subteraj kaj ĉielaj venas kaj partoprenas en nia samgo. Kaj arahantoj venas por solvi siajn dubojn. Ni neniam ne gvidas ilin pri la metodo klare koni la kor-kernon (=ver-vekiĝon). Ĝis nun mi neniam aŭdis, ke tia maniero troviĝas en la aliaj samgoj. Budhistoj lernu nur la pravan budhismon.

<4-4> Kaj aliflanke, (vi devas scii, ke) la bodio ne mankas eĉ al ordinaruloj. Ili ĉiam uzas la bodion por ĉiutagaj aferoj, sed ĉar ili ne rimarkas ĝin, kaj kutimiĝas starigi sian et-saĝan opinion. Ili erare komprenas, ke la nun vidata objekto eterne troviĝas. Pro tio ili preterlasas la veran vojon. Kaj pro tiu miskompreno ili erare imagas iluzian floron en la aero. Ili vane diskutas pri la 12 pro-motivaj estiĝoj, la 25 viv-fazoj, la 3 aŭ 5 vehikloj kaj esto-malesto de budho --- senfine. Vi ne alprenu tiujn diskutojn kiel la pravan metodon de la budhisma ekzerco. Nun vi devas forlasi ĉiujn diskutojn en la nomo de la budha kor-signo, kaj rektanime zen-sidadi. Kaj senrilate, ĉu vi estas ordinara aŭ saĝa, vi povas facile transiri la muron de ordinara vivo (al la bodio), povas facile promeni en la transa mondo, kaj ĝui la bodion. Al tiu ĉi mondo studantoj, kiuj estas detalemaj je la vortoj de sutroj, ne povas kune marŝi kun ni.

<5-1> Volu montri. La vorto 'zeno' troviĝas en la 3 (devigaj) lecionoj (=ŝilo, zeno, praĝnjo) por ĉiuj budhistoj, kaj en la 6 (ekzercendaj) paramitoj (=ofero, ŝilo, elteno, klopodo, zeno, praĝnjo), kiujn budhistoj devas nepre praktiki. Konsekvence ĉiuj lernantoj lernas ĝin de la lerno-komenco. Ili devas nepre sinekzerci senrilate, ĉu ili estas saĝaj aŭ ne. La zen-sido, kiun vi diras, devas esti unu el tiuj. Kial vi diras,ke la tuta instruo de Gotamo

la Budha kolektiĝas en la zen-sido?

Mi montru. Vi eble demandis, kial oni nomas simple zenismo la plej altan instruon de Budho nomatan<la Kerno kaj Amplekso de l' Vera Instruo>.

Vi sciu. La nomo 'zenismo' ekaperis en Ĉinio, ne troviĝis en malnova Hindio. Komence, dum la zenisto Bodidarmo sidadas en la viharo Ŝjaŭlin (Ĉinio), neniuj sciis, ke tio estas la vera budhismo. Oni nomis lin brahmanisto, kiu lernas la zen-sidon. De tiam ĉiuj heredintaj majstroj ĉiam zen-sidadis. Trovinte tion laikoj nomis ĝin la skolo de zen-sido. Nuntempe oni diras ĝin sole zenismo foriginte la vorton 'sid'. La enhavo de la zenismo (, mi ne havas spacon skribi ĉi tie) estas klare montritaj en la verkaĵoj de malnovaj budhistoj. El tiuj vi povas trovi, ke la zen-sido, kiun mi diras, estas tute alia malkiel tiuj de la 3 lecionoj kaj de la 6 paramitoj. (Kvankam la nomo estas sama)

<5-2> Historie ne estas malklare, ke la zeno estas aŭtentika instruo de Gotamo la Budha. Iam Li nomis Maha-kassapa sola, kiel Lian sukcedanton por heredigi la plej altan instruon<la Kerno kaj Amplekso de'l Vera Instruo> sur la monto Agla Pinto (=la zenisma legendo nomita 'rideto al plukita floro'). Ne necesas dubi tiun aferon, ĉar unuj el tiamaj kunvenintoj, kiuj nun loĝas sur la ĉielo, vidis tiun heredon antaŭ la okuloj. Budhismo estas protektata de tiuj ĉieluloj por ĉiam, kaj la protekta forto ankoraŭ ne konsumiĝas.

Vi devas scii, ke nia zen-sido estas la tuta amplekso de budhismo, kaj neniuj aliaj metodoj estas kompareblaj.

<6> Volu montri. Kial vi rekomendas nur la sidon en la kvar agoj (=iri, halti,sidi kaj kuŝi) por ver-vekiĝi?

Mi montru. Estas malfacile scii, en kiu metodo iamaj budhistoj povis ver-vekiĝi. Se mi dirus, mi povas diri, ke la zen-sido estas kutima ekzerco de budhismo de antaŭe, ne necesas serĉi la aliajn metodojn. Kaj mia gvidanto laŭdis kaj diris "Zen-sido estas facila metodo". Ĉe tio mi pensis, ke la sidado estas plej facila en la kvar agoj. Krom tio la zen-sido estas ekzerco-metodo ne nur de unu aŭ du antaŭuloj, sed ankaŭ de ĉiuj majstroj.

<7-1> Volu montri. La ekzerco per la zen-sido estus taŭga al tiuj, kiuj ankoraŭ ne ver-vekiĝas. Sed kion atendu de la zen-sido jam ver-vekiĝintaj personoj?

Mi montru. Kvankam oni diras, ke ne rakontu revon al miopulo, kaj ne konfidu remilon al montano. Sed mi plu klarigu.

Rigardi, ke la ekzerco kaj ver-vekiĝo estas malsamaj du, estas ekster budhisma opinio. En la budhismo la ekzerco kaj ver-vekiĝo estas sama afero. Ĉar la ekzerco estas alia flanko de la ver-vekiĝo. Pro tio la zen-sido fare de eĉ komencanto estas la tuta amplekso de la ver-vekiĝo. Ni gvidas lernantojn dirante, ke ne atendu ver-vekiĝon, ĉar ver-vekiĝo estas intua (ne estas logika). Ĉar ekzerco estas ver-vekiĝo, ver-vekiĝo ne havas finon. Kaj ĉar ver-vekiĝo estas ekzerco, ekzerco ne havas komencon. Sur tia koncepto Gotamo la Budha kaj Maha-kassapa ĝuis la zen-sidon sur la ver-vekiĝo, Bodidarmo kaj Daĝjan (ĉino) aplikis zen-sidon sur la ver-vekiĝo. Ĉiam same okazis, kiam mi spuris aŭtentikajn budhistojn.

<7-2> Mi ĵus klarigis, ke la ekzerco kaj ver-vekiĝo estas sama afero. Feliĉe ni heredas la mirindan metodon de la ekzerco. Pro tio ni scias, ke de la komenco de ekzercado eĉ komencantoj povas akiri certgradan bodion sur la eterna tero (=en la darma mondo). Tial

la majstroj ĉiam gvidis nin dirante, ke ne estu maldiligenta en la ekzercado, por ke ne malpurigu sian bodion per kleŝoj. Kiam oni forgesis la ekzercon en la ekzercado, li ver-vekiĝas, kaj kiam li eliris el la ver-vekiĝo, rimarkas,ke li sinekzercis tutkorpe.

Kiam mi estis en Ĉinio, mi vidis, ke ĉiuj zen-viharoj havas sian ekzercejon, kaj kolektinte 5-6cent aŭ 1-2mil ekzercantojn, igas ilin zen-sidadi tage kaj nokte. Kaj kiam mi demandis ekzercej-estrojn, kiuj heredas la budhan kor-signon, pri la pensmaniero de la budhismo, ili respondis, ke la ekzerco kaj ver-vekiĝo ne estas malsamaj du.

Ili rekomendas al la kolektiĝintaj, ne nur siaj disĉiploj, sed ankaŭ lernantoj, kiuj vizitis de ekstere, kaj personoj, kiuj serĉas la homan veron en budhismo, senrilate, ĉu li estas komencanto aŭ ne, kaj ne distingante, ĉu li estas plebano aŭ potenculo, zen-sidadi laŭ la instruo de Gotamo la Budha.

Iu majstro diris "Certe troviĝas la ekzerco kaj ver-vekiĝo. Oni devas ne malpurigi sian ver-vekiĝon per siaj kleŝoj". Kaj aliokaze li diris "Kiu akiris ver-vekiĝon, sinekzercas per la ver-vekiĝo". Ĉe tio ni povas scii, ke oni sinekzercas en la akirita ver-vekiĝo.

<8> Volu montri. Kial iamaj majstroj enkondukis nur la sutrojn, sed ne la ekzercan metodon, kiam ili reniris de Ĉinio?

Mi montru. Ĉar ili estis gvidantoj de homoj (ne de ĉieluloj). Kaj ili ne enportis ĝin, probable ili pensus, ke la tempo ankoraŭ ne venas.

<9> Volu montri. Ĉu la iamaj majstroj mastris la metodon?

Mi montru. Ili mastrus ĝin, se ili havus ŝancon lerni.

<10-1> Volu montri. Mi aŭdis. "Ne lamentu pri la morto, ĉar por elsaviĝi el la renaskiĝo kaj morto troviĝas facila rimedo. Tio estas scii, ke la koro (=animo) vivas konstante (=senmorte). Nome, la korpo nepre mortos, ĉar ĝi naskiĝis, sed la animo ne pereas. Se oni scias, ke la animo, kiu ne rilatas al naskiĝo kaj morto, troviĝas en sia korpo, li komprenas, ke la animo ja eatas mastro de la korpo, dum la korpo estas provizora. Ne estas certe, kie la korpo mortos, kie renaskiĝos, dume la animo estas senmorta, ne ŝanĝiĝas en estinteco, estanteco kaj estonteco. Tiele scii signifas elsaviĝi el la naskiĝo kaj morto."

"Tiu, kiu ekscias la rimedon, povas eniri en la animan maron post la fino de la ĝis- nuna renaskiĝo, kaj li havos virton de budhoj. Sed, eĉ se li ekscias la rimedon, lia virto ne sufiĉas malkiel tiu de la budhoj, ĉar lia korpo estas farita de la karmoj en la antaŭa vivo. Tiu, kiu ne scias la rimedon, devas daŭre morti kaj renaskiĝi. Se tiel okazas, li tuj komprenu, ke la animo estas senmorta. Kion vi atendas nur senfare sidante por la tuta vivo?" Ĉu tiu ĉi logiko estas taŭga por la vojo de budhoj kaj majstroj?

<10-2> Mi montru. La logiko, kiun vi nun diris, tute ne estas budhisma, sed fikcia rakonto de Nagasena.

Laŭ ĝia koncepto; La animo troviĝas en la homa korpo. Kaj la animo okaze distingas ion ŝatinda aŭ ne, taksas ion bona aŭ ne, perceptas doloron aŭ jukon,kaj sentas ion suferiga aŭ komforta. Tiuj ĉi estas nur funkcioj de la animo. Kaj kiam la korpo pereas, la animo eliras kaj renaskiĝas en alia korpo. Nome, ŝajne la animo ĉi tie estingiĝis, sed aliloke reaperas. Pro tio la animo estas konstanta por ĉiam. Via diraĵo estis tia.

Tiun logikon oni adaptis al budhismo. Sed tio estas pli malsaĝa ol, ke oni misjuĝas tegol-

pecon kiel oran trezoron. Malsaĝe kaj hontinde, komparebla al nenio! Tiun eraran logikon forte negis la zenisto Nanjang en Ĉinio. Dirante<animo-konstanta,korpo –pereema> oni pensas, ke ĝi estas instruo de budhismaj majstroj. Ĝi ja estas kaŭzo de renaskiĝo, sed li deziras elkateniĝi el la metem- psikozo. Kia stulta li estas! Plej kompatinde. Sciu, ĉar ĝi estas eksterbudhima, vi ne bezonas aŭskulti.

<10-3> Tre bedaŭrinde, se vi kredus la falsan logikon. Sed mi plue klarigu por savi vin de la miskompreno. Vi devas scii. En budhismo dekomence la koro (=animo) kaj la korpo estas unu, la kerno kaj la ekstero ne estas du. Ĉar tio ĉi estas sama koncepto ankaŭ en Hindio kaj Ĉinio, kontraŭi al tio estas sensence. Aliflanke, en la opinio de animo ĉiam-daŭra, ĉio daŭras. Sed en tio oni ne diskutas pri la korpo disde la animo. Kaj en la opinio de animo sen-daŭra, ĉio finiĝas,sed oni ankaŭ ne dividas la kernon disde la ekstero. Spite al tio vi pretendas 'la korpo perea sed la animo konstanta'. Ĉu tio ne kontraŭas al la vera teorio budhisma? Ne nur tio, se temas pri nirvano, ĝi (=trankvila vivstato) ja troviĝas en homa ĉiutaga vivo. Ni ne traktas nirvanon ekster la vivo.

Eĉ se oni volas adapti la falsan logikon al la budha saĝo, kiu superas la morto kaj naskiĝo, estas sensence, ĉar la animo, kiu povas percepti kaj kompreni, kune naskiĝas kaj mortas kun la korpo. Vi ne povas diri, ke nur la animo estas senmorta. Ĉu tio ne estas sensenca diskuto!?

<10-4> Vi devas detale observi, ke 'la animo kaj korpo estas unu (=ne du)' estas fundamenta tezo de la budhismo. Se jes, kial oni povas diri, kiam la korpo pereas, la animo sola foriras de la korpo kaj ne estingiĝas por ĉiam? Se okazus,ke foje ambaŭ kuniĝas kaj foje malkuniĝas, la budhisma tezo fariĝas malvera. Kaj se ne necesas pripensi morton kaj naskiĝon de la korpo, vi pekas negi la budhismon. Ne pensu tiel.

Vi devas scii. En la budhisma frazo 'la koro egalas al ĉio ekzista (=ĉio dependas de la koro)' neniu dividas la kernon dis de la ekstero pri ĉio ajn, kaj nek traktas ĝiajnnaskiĝon kaj estingiĝon.

Kaj ĉio, ĝis la bodio ankaŭ la nirvano estas problemoj nur en la koro (de vivanta homo). Kaj ĉia ekzisto apartenas al la koro, en kiu nenio mankas, nek superfluas, ĉar ĉio okazas en la koro. Pri tio jam ne necesas diskuti. Tiu ĉi klarigo estas ŝlosilo por kompreni la koncepton de budhismo.

Budhisma tezo estas tia. Kial necesas disigi la korpon disde la animo, kaj la ĉiutaga vivo disde la nirvano? Ni jam estas budhanoj, ne bezonas aŭskulti diraĵojn de eksterbudhisma teorio.

<11> Volu montri. Ĉu tiu, kiu zen-sidas, devas rigore observi la ŝilaron?

Mi montru. Observi ŝilaron kaj vivi morale estas la leĝo de zenismo kaj la vivmaniero de budhisto. Sed ankaŭ tiuj, kiuj ankoraŭ ne akceptis kaj kiuj mal- observis la ŝilaron, ne povas ne ricevi iom da merito de la zen-sidado.

<12> Volu montri. Ĉu io malhelpas al tiu, kiu zen-sidas kaj samtempe sinekzercas en mantrismo aŭ tendai-ismo?

Mi montru. Kiam mi estis en Ĉinio, mi demandis al tieaj gvidantoj. Ili respondis, ke troviĝas neniuj antaŭuloj, kiuj ĝuste heredis la budhan kor-signon, sinekzercis samtempe

per du metodoj ĝis nun en Hindio kaj Ĉinio. Neniu povas atingi celon, se li ne strebas en unu vojo.

<13> Volu montri. Ĉu la ekzercon povas fari ankaŭ viroj kaj virinoj de laikoj, sed nur elirintoj povas?

Mi montru. La majstroj diris. Por sinekzerci en budhismo ne gravas, ĉu ili estas viro aŭ virino, ĉu nobelo aŭ plebano.

<14-1> Volu montri. Elirintoj povas tuj forlasi sin de sociaj rilatoj kaj forigi malhelpojn por sinekzerci. Do, kiel sinekzercu laikoj, kiuj ĉiam okupiĝas de ĉiutaga vivo, por laŭiri la eternan vojon de Budho?

Mi montru. Pro la granda kompato Gotamo la Budha malfermis larĝan pordon por, ke ĉiuj homoj eniru (en la bodion). Kiuj homoj kaj ĉieluloj ne volas eniri? Se vi historie esplorus pri tiu temo, vi trovos multajn pruvojn. Ekzemple,Daj-zong kaj Ŝun-zong, kvankam ambaŭ estis reĝoj (de la regno Tang, Ĉinio) multe okupitaj de politikoj kaj privataj aferoj, pene sinekzercis per zen-sido kaj mastris la budhan vojon. La ĉefministroj Li kaj Fang, ambaŭ estis ĉef-asistantoj de reĝo, tamen ankaŭ ili akiris ver-vekiĝon. Laŭ tio kompreniĝas, ke nur la koro decidas sinekzerci aŭ ne. Ne rilatas, ĉu li estas laiko aŭ elirinto. Kaj homo, kiu profunde pensas valoron de io, senscie utiligas budhisman kriterion. Dume, tiuj, kiuj pensas, ke socia vivo baras la budhan vojon, ankaŭ pensas, ke la budha instruo ne estas utila por socia vivo. (Sed de flanke de budhismo,) en la budha instruo ne troviĝas neutila ideo por socia vivo. Tion ili ne scias.

<14-2> Lastatempe estis la ministro Ping en Ĉinio. Li estis altranga kortegano kaj konis la budhan vojon. Iam li faris versaĵon pri si.

Mi ŝatis zen-sidi paŭze de la okupo,  
dormis malofte kuŝante sur la lito.  
Kvankam mi oficas kiel kortegano,  
multaj scias min kiel zen-veteranon.

Ĉe tio ni sciiĝas, eĉ se oni estas okupata de sia laboro, se li profunde deziras budhismon, povas ver-vekiĝi. Ni devas vidi nin komparante kun agoj de aliuloj, kaj necesas al ni speguli estintecon al nun.

Nun en la granda regno de Ĉinio la reĝoj, ministroj, nobeloj kaj plebanoj, viroj kaj virinoj, neniuj ne pendigas budhismon en la koro. Militistoj kaj oficistoj, ĉiuj deziras zen-sidi. El la dezirantoj nepre ĉiuj povas ver-vekiĝi. Ĉe tio sciiĝas, ke ofico ne baras la ekzercon.

Se la vera budhismo disvastiĝas en la lando, ĉar budhoj kaj ĉieluloj ĉiam protektas, la lando estas kvieta kaj paca. Se la lando estas paca per la budhismo budha forto pligrandiĝas.

Kiam vivas Gotamo la Budha, eĉ perfiduloj kaj miskomprenantoj povis akiri la ver-vekiĝon. Sub majstroj eĉ ĉasisto kaj hakisto ver-vekiĝis (=anekdotoj en la ĉina zen-skolo), des pli ordinaruloj. Necese estas peti la instruon de aŭtentika gvidanto por ver-vekiĝi.

<15> Volu montri. Ĉu per tiu ĉi ekzerco oni povas ver-vekiĝi eĉ en la degenera periodo de budhismo, kiel nun?

Mi montru. Kvankam ĝisnunaj sektoj, kiuj starigis sekton per sutroj, diras diversajn klarigojn, tamen la prava mahajano ne dividas budhismon en tri periodojn (la vera, la imita,la degenera). Se oni sinekzercas, senrilate al la periodoj ĉiuj ekzercantoj povas atingi la ver-vekiĝon. Precipe ĉar en tiu ĉi rekte heredita metodo oni utiligas sian mirindan trezoron (= la koron), li povas distingi per si mem, ĉu li ver-vekiĝis aŭ ne, same kiel li povas distingi per si mem trinkinte la akvon varma aŭ ne.

<16-1> Volu montri. Iu diris "Se oni povas kompreni, ke 'la koro mem estas budho', li jam ne bezonas reciti sutrojn nek sinekzerci. Kaj jam nenio mankas al li je la budhismo. Ĉar li scias, ke la bodio troviĝas dekomence en si mem, kaj tio estas la tuta amplekso de la budhismo, li ne bezonas lerni de aliuloj." Des pli "Kial li bezonas persekuti sin per la zen-sido?" kiel vi opinias pri tio?

Mi montru. Tiu diraĵo estas plej sensenca. Se lia konkludo estus prava, iu el antaŭuloj nepre mencius tion al ni. Tamen nun neniu scias tian aserton.

Vi devas scii. Oni lernas budhismon ne dividante sin de la aliaj. Se budhismo estus scii 'budho en sia koro', Gotamo la Budha ne ĉagreniĝus por edifi homojn. Nun mi klarigu tion per la anekdoto de malnova eminentulo.

<16-2> Iam antaŭe troviĝis (en Ĉinio) la vihar-oficisto Ze en la viharo de la zenisto Fajan. La zenisto demandis "S-ro Ze. Kiom pasis de kiam vi venis al ni?"

Ze respondis "Jam pasis 3 jaroj de kiam mi aniĝis al via samgo."

La zenisto diris "Vi estas posteulo por mi. Kial vi ne demandas min pri la budhismo?"

Ze respondis "Mi ne volas diri malveron al nia majstro. Iam, kiam mi estis ĉe la zenisto Cingfeng, mi akiris trankvilon je la budhismo."

La zenisto demandis, "Per kiu frazo vi povis akiri?"

Ze respondis "Kiam mi demandis lin 'Kio estas la memo de ekzercanto?', li respondis "La knaboj Bing kaj Ding venis por peti fajron."."

La zenisto diris "Estas bela frazo, sed eble vi ankoraŭ ne akiris."

Ze diris "Bing kaj Ding estas fajretoj. Pro tio la frazo signifas, ke fajro venis por peti fajron. Tio estas sama kiel memo serĉas memon."

La zenisto definitive diris "Nun klare montriĝas, ke vi ankoraŭ ne akiris. Se labudhismo estus tia, ĝi ne herediĝus ĝis nun!"

Ze ege ĉagreniĝis kaj foriris. Sed sur la vojo li pensis 'Nia zenisto estas famekonata eminentulo, kaj gvidas 500 ekzercantojn. Li volus deadmoni min de mia miskompreno. Certe li devas havi ion lernindan.' Ze reniris, pardonpetis kaj dankis pro la deadmono.

Kaj li demandis "Kio estas memo de ekzercanto?"

La zenisto respondis "La knaboj Bing kaj Ding venis por peti fajron."

Ze povis ĉifoje ver-vekiĝi sub la frazo de la zenisto.

Estas klare al mi, ke scii<budho en sia koro> ne signifas<koni la budhismon>. Se scii<budho jam en sia koro> estus la budhismo, la zenisto ne gvidus per tiu frazo, kaj tiurimede li ne deadmonus, mi pensas.

Ekzercanto demandu la rimedon pri la ekzerco, kiam li unue renkontisgvidanton. Strebu en la zen-sido, ne restigu en si sian arbitran komprenon. La belega metodo de budhismo ne estas vana.

<17>Volu montri. Konsultante malnovajn historietojn en Hindio kai Ĉinio oni diras, ke iu ver-vekiĝis, kiam li aŭdis resonon de banbuo (frapita de ŝtoneto, kiun li forbalais). La alia ver-vekiĝis, kiam li rigardis persikan floraĵon (post longa paŝ-vojaĝo). Krom ili, Gotamo la Budha ekkonis la vojon, kiam Li vidis la stelon Venuso, kaj la budhisto Ananda klare sentis la darmon, kiam li kuŝigis flag-stangon (antaŭ la ekzercejo). Ne nur tiuj, sed ankaŭ inkluzive de la 6-a zen-sukcedanto Daĝjan (ĉino), multaj budhistoj en la 5 skoloj (en Ĉinio) ver-vekiĝis per unu vorto aŭ mallonga frazo. Sed ne ĉiuj el ili zen-sidis, mi pensas.

Mi montru. Certe troviĝis tiuj, kiuj ver-vekiĝis per sono de banbuo aŭ pejzaĝo de floroj. sed ili jam de longe sinekzercis, kaj bone sciis, ke ne troviĝas la dua persono. (=Inter vidanto kaj vidato ne troviĝas distingo en ver-vekiĝo). Tiele direblas.

<18-1> Volu montri. Homoj en Hindio kaj Ĉinio estas karaktere honestaj. Kaj ĉar ili loĝas en la centra tero de kulturo, ili povas facile akcepti budhismon, kiam oni edifas. Kontraŭe, al nialandanoj mankas saĝo kaj humaneco. Pro tio estas malfacile enradikigi la semon de budhismo. Tion kaŭzas la malfruo de kulturo. Tre bedaŭrinde. Krom tio, la elirintoj (=budhistoj) de nia lando estas malpli saĝaj ol la laikoj en la grandaj landoj. Preskaŭ ĉiuj japanoj estas malsaĝaj, havas malvastan koron. Ĉiam ili deziras esti laŭdata, kaj taksas videblan rezulton. Ĉu ankaŭ tiaj aĉuloj povos tuj akiri la ver-vekiĝon, se ili zen-sidos?

<18-2> Mi montru. Vi pravas. Al nialandanoj ordinare mankas humaneco. Eĉ se oni montris la veran instruon al ili, pro miskompreno la amrito (=la vera instruo) ŝanĝiĝus al veneno por ili. Ili emas avidi propran renomon kaj profiton, kaj estas malfacile forigi ĝiajn obsedojn. Kvankam ili estas tiaj, tamen oni ne ĉiam bezonas la ordinaran saĝon por laŭiri la vojon al la budha mondo. Ekzemple, kiam ankoraŭ vivas Gotamo la Budha, iu akiris la kvar etapojn al budhiĝo per pilko, kaj la alia ver-vekiĝis nur per kaŝajo (=kostumo de budhisto). Kvankam ambaŭ estis nekredeble malsaĝaj kiel brutoj, tamen per la helpo de sincera kredo ambaŭ povis forigi sin de la tenebro. Aliokaze, piulino povis ver-vekiĝi pro regalo al maljuna kaj malklera ŝramano, kiu eĉ ne povis prediki al ŝi pro nescio (=tiuj estas hindaj budhismaj legendoj). Konsultinte tiujn ekzemplojn ni rimarkas, ke ne necesas la saĝo, libro, frazo nek prediko por ver-vekiĝi, sed ili helpiĝis nur de la sincera kredo.

De kiam budhismo fondiĝis, apenaŭ pasis dumil jaroj por disvastiĝi en la mondo. Kaj la landoj estas diversaj. Ne ĉiuj landoj estas bonaj. Ne ĉiuj landanoj estas saĝaj. Sed ĉar la Budha instruo havas mirindan virt-forton, kiam la tempo venis, budhismo disfloras en tiu lando. Kaj se oni havas ĝustan kredon kaj sinekzercas, senrilate, ĉu li estas saĝa aŭ ne, nepre li povas atingi la bodion. Ne pensu, Ankaŭ en nia lando homoj ne estas honestaj nek saĝaj, tamen ili povas adaptiĝi albudhismo. Dekomence ĉiuj homoj sufiĉe havas budhan saĝon, sed ĉar nur malmultaj rimarkas ĝin, la multaj aliaj ne kutimas ĝin utiligi.

(Pardonu min, ĉar) tiu ĉi skribo estas komplikita pro la reciprokaj demandoj kaj respondoj. Mi florigis iluziajn florojn (=provizorajn diskutojn) en la senflora aero. Sed ĉar ĝisnun la zen-metodo ankoraŭ ne estis enportita en nian landon, tiuj, kiuj deziras lerni zenon, estus malkontentaj. Pro tio mi verkis ĉi tiun el scikonoj kolektitaj en Ĉinio, kaj el la preciza koncepto de ver-vekiĝintoj, por respondi al la deziro de la lernontoj. Krom tio necesas la detaloj de precepto kaj ekipaĵoj de zen-viharo, sed nun mankas marĝeno por skribi. Kaj tiuj ne estas temoj facilanime trakteblaj.

Nia lando situas for de Ĉinio oriente sur la east-ĉina maro, sed jam en la periodoj de Tennooj Kinmei kaj Joŭmei budhismo informiĝis de okcidentaj landoj. Tio estis feliĉa por nialandanoj, sed ĝisnunaj sutroj,organizoj kaj ceremonioj estas komplike diversaj, kaj estas malfacile trovi kiel sinekzerci.

Nun mi vivas kun ĉifonaj vestoj kaj simplaj ilaroj loĝante en kabano apud sovaĝa naturo. Kaj dum mi sinekzercis per zen-sido en tia medio, tuj sentis la altiĝon de la budheco, kaj atingis la ekstremon de la bodio, kiun mi aspiris kiel celon de la tuta vivo. Loĝi en naturo estas spuri la zeniston Longja, kaj la ekzerc-maniero de la pasea Budho Kassapa. Pri la konkreta metodo de zen-sido vi konsultu<Invito al Zen-sido>, kiun mi verkis en Karoku-jaroj.

Por disvastigi budhismon en la tuta lando validas reĝa dekreto, tamen kiam mi rememoras la testamenton de Gotamo la Budha sur la monto Agro-pinto, mi pensas, ke nuntempaj reĝoj kaj altranguloj de diversaj regnoj renaskiĝis neforgesinte sian mision protekti budhismon, kiun ili promesis kun Gotamo la Budha okaze de tiama vivo. Pro tio direblas, ke en la regnoj, kiujn ili regas, ne troviĝas ne-budhismaj landoj. Se jes, oni ne bezonas elekti lokon nek atendi tempon por disvastigi budhismon. Nur hodiaŭ venis la ŝanco por komenci, mi tiel pensas.

Se tiel okazas, mi donacu tiun ĉi skribon al saĝuloj, kiuj atendas la veran budhismon kaj al diligentaj studantoj, kiuj vagas serĉante la budhan vojon.

Nun estas mez-aŭtune en Kangi la tria (=pk1231).

Verkis ŝramano Doŭgen, kiu heredis la budhan kor-signon en Ĉinio.